



FLANDRA ESPERANTISTO


MONATA REVUO

ORGANO DE LA FLANDRA
ESPERANTO
MOVADO



N.E.L.E.* (Nis Estas La Estonteco)
Flandra Esperantista Grupo
Ejo * Breughel *
Esp. Jacquainlaan, 87, Brussel (Belg.)

Officieel  Orgaan
van den 

Vlaamschen
Esperantisten -
Bond 



Administranto: A. De Keyzer, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.

JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj.

Kun membreco al « Flandra Ligo Esperantista »: 25 fr.

Eksterlando: 6 belgoj.

Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag

Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Postëekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

EL LA PREZARO:

La Viro el Francujo — Ivans	29,—	bind
Gösta Berling — S. Lagerlöf	55,—	»
Riĉa kaj sen Mono — Oppenheim	29,—	»
La Ora ŝtuparo — Oppenheim	29,—	»
Si — H. Rider Haggard	29,—	»
Petrolo, vol. 1 — U. Sinclair	29,—	»
Petrolo, vol. 2 — U. Sinclair	29,—	»
Luno de Izrael	29,—	»
La Dormanto Vekiĝas	29,—	»
Pallieter — F. Timmermans	28,—	»
La Leono de Flandrujo — H. Conscience	32,—	»
Tra la Labirinto de la Gramatiko	40,—	»
Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	7,50	broŝ.
La Du Amatinoj — de Musset	7,50	»
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf	12,—	»
Gösta Berling — S. Lagerlöf	45,—	»
La Homaj rasoj de la Mondo	24,—	»
Kudlago, la malgranda eskimo	5,—	»
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto	4,—	»
Stranga Butiko. — R. Schwartz	10,—	»
Maria kaj la Grupo. (L.M.-Libro)	22,—	»
Konversacia Literaturo (Cseh-metoda)	12,—	»
Fundamenta Krestomatio — Zamenhof	20,—	»
Nieuw Leerboek (geïllustreerd)	12,—	»
Examenopgaven	10,—	»
Muses E-Biblioteko (10 volumeutoj)	41,—	»
Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck	5,—	»
Zakwoordenboekje (2400 stamwoorden)	2,50	»
Schidlof Zakwoordenboek	25,—	bind
Groot Woordenboek Van Straaten	80,—	bind
Beknopt Woordenboek Van Straaten	40,—	bind
Plena Vortaro de Esperanto	84,—	bind
Flandra Esper. 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a jarkolektoj	15,—	broŝ.
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n ^o 1)	10,—	»

INSIGNOJ: Malgranda verda stelo: 2.00 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 3.— fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 4.50 fr.

Flandra kaj Esperanta flagetoj: 5.— fr.

Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1.— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3.— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.

Esperanto in de Praktijk.

FINLAND

Een geïllustreerd foldertje met tekst in Esperanto van de Finsche stad Uusikaupunki is kosteloos verkrijgbaar bij : Esperanto-Societo de Uusikaupunki, Finland.

FRANKRIJK

De « Raidoclub Espérantiste de France » groeit gestadig en telt reeds meer dan 1.400 leden. Deze vereeniging heeft vertegenwoordigers in 37 departementen en laat twee bladen verschijnen : « Radio-Espéranto » en « Internacia S. O. S. Bulteno ». Dertien Fransche radiostations zenden regelmatig uit in Esperanto.

Het bestuur van P.T.T. heeft met het oog op de Parijzer tentoonstelling, postbedienden-Esperantisten in dienst genomen.

De jaarbeurs van Parijs maakt geregeld gebruik van Esperanto. Ook dit jaar gaf zij een keurige affiche benevens een geïllustreerde folder in de wereldtaal uit, terwijl ook de toegangskarten voor Esperantisten geheel in de internationale taal gesteld waren. De jaarbeurs gebruikte Esperanto voor haar briefwisseling met 27 landen.

Door het nationaal syndikaat der Fransche onderwijzers werd een oproep gericht tot al haar afdelingen om te ijveren voor de verspreiding van Esperanto onder het onderwijspersoneel en voor de invoering van Esperanto in de scholen.

JAPAN

Aan de 800 kandidaten voor de parlamentsverkiezingen in Japan, werd hun meening gevraagd over Esperanto ; 143 gaven antwoord, waarvan zich 131 vóór Esperanto verklaarden. Van deze 131 werden er 78 gekozen, een bewijs dat het niet de minste waren die een gunstig antwoord zonden.

JOEGOSLAVIE

Een geïllustreerd prospectus van Ljubljana, met een plattegrond, is verschenen. Deze derde uitgave van de V.V.V. van Ljubljana is smaakvol uitgevoerd. Gratis verkrijgbaar bij : Tujskopremet svet mesta Ljubljana, LJUBLJANA Auerspergova palača, Jugoslavio.

NEDERLAND

In « Het Amstelveensch Weekblad » en « De Amstelklokken », katholieke weekbladen, verschijnt regelmatig een Esperanto-hoekje. In « De Vrijdenker » werd ook een vaste Esperanto-rubriek geopend.

Het internationaal kongres van « Sennacieca Asocio Tutmonda » (S.A.T.) wordt dit jaar te Rotterdam gehouden van 31 Juli tot 5 Augustus.

POLEN

Te Warschau vindt dit jaar het Esperanto-wereldkongres plaats. Voor de politie der Poolsche hoofdstad werden Esperanto-kursussen ingericht met 249 deelnemers. Kursussen voor trampersoneel zijn in voorbereiding.

SOVJET-RUSLAND

De nieuwe Russische grondwet is in Esperanto-vertaling verschenen. De vertaling werd door het bestuur van S. E. U. (Soveta Esperantista Unio) verzorgd.

Flandra Esperantisto

Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiumonate

Ĉefredaktoro:

A. Pittoors
Ten Eeckhovelei, 125
Deurne-Noord
Antwerpen



Administranto:

Adolf De Keyzer
P. vanHumbeekstr, 3
Brussel (West)

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belgoj

Kun membreco al F.L.E.: 25 fr.

Eksterlando: 6 belgoj

Poŝtĉeko: 2321.50 de F.L.E. Brussel.



En la Sekciojn!

Post Lebbeke sekvis la fondiĝo de novaj sekcioj en Brugge, Gent, Wervik, Wevelgem kaj Zwevegem; Flandra Ligo Esperantista nun nombras 26 sekciojn. Ni esperas ke tiuj novaj grupoj iĝu fortikaj branĉoj de la vivoplene verdanta arbo kiu estas nia nacia Ligo.

La fruktojn de nia vintra agado ni nun rikoltas kaj laŭ esperigaj antaŭsignoj ni povas aserti, ke ni nur komencas la rikoltadon kiu antaŭvidiĝas abunda. Multaj informpetoj nin atingas de novaj Esperanto-kernoj kiuj deziras stariĝi kiel organizitaj grupoj kaj aliĝi kiel sekcioj al la nacia movado. Ni estas survoje al la efektivigo de nia aŭdaca plano: 50 sekciojn kaj 1.000 membrojn fine de 1937/38.

Ni nun staras je la sojlo de nova jaro; dum la ĵus pasinta jaro ni sukcesis duoblighi nian anaron, ni fidas je nia juna kaj entuziasma fervoro por denove atingi saman rezulton.

La rolo plenumota de la sekcioj estas plej grava por la bonfarto de nia ligo, se kelkaj grupoj ne plenumus la taskon kiun ni atendas de ili, ni estus devigataj konsideri ilin kiel balaston kaj ĉiuj ni ja scias, ke balaston oni forjetas en oportuna momento. Ni tamen estas konvinkitaj ke neniu el niaj sekcioj volas per malaktiveco bremsi la antaŭeniron de nia ligo. Aliĝante al F.L.E. niaj sekcioj subskribis formularon kies enhavon ili ĉiel kaj ĉiam devas atenti. Per orda laboro niaj sekcioj iĝos la fortikaj apogiloj kiujn bezonas F.L.E.

Se ni analizas la enhavon de la jarraporto de F.L.E., ni konstatas ke ekster la sekcioj 127 personoj montris sian intereson por nia laboro abonante F. E. Multajn de tiuj izoluloj ni trovas en lokoj kie nia Ligo posedas sekcion. Ĉu ili konscias ke tia izoligo grave malhelpas la lokan Esperantan vivon? Eĉ se al tiuj izoluloj estas malebla, pro profesiaj aŭ aliaj kialoj, regule ĉeesti la grupkunvenojn, kiel konsciaj Esperantistoj ili devas kompreni, ke tamen estas devo apogi la sekciojn eĉ per pli malpli formala aliĝo.

La grupoj en Flandrujo plenfide aliĝas al nia movado, niaj izolaj liganoj, en kies urbo aŭ vilaĝo troviĝas sekcio de F.L.E., same plenfide eniru la sekciojn!

E. C.

La Instruado de la dua Lingvo en Flandrujo

Mi plurfoje spertis, ke la lingva situacio en Flandrujo estas malfacile komprenebla por eksterlandanoj kaj ke eĉ niaj Nederlandaj samlingvanoj ofte havas eraran koncepton de la problemo. Tiu ĝenerala malsecio en eksterlando estas sendube la sekvo de la multaj facetoj kiujn la problemo prezentas. Ĝi tie mi nur priparolos la aferon el pedagogia vidpunkto, ĉar de la komplekso, tiu ĉi estas la plej grava flanko kiu, laŭ mia opinio, superas la politikan. Tiel agante, mi tamen ne volas kredigi, ke la koncerna leĝaro estas perfekta, kontraŭe. La Flandroj tamen akiris kelkajn gravajn plibonigojn, kiuj ebligas daŭrigi la luktadon pli efike kaj konstruadi plue sur la bazo de jam akiritaj rezultoj.

Alian aspekton de la problemo prezentas la fako ke ni ne havas sufiĉan konon de nia propra lingvo : la Nederlanda. Pri tio kulpas la multjara altrudo de la Franca lingvo, altrudo kiu kreis la sekvant-tan fisituacion : mezinstruita Flandro havas sufiĉan konon nek de la Nederlanda nek de la Franca lingvo. Grandparte nia popolo nur parolas siajn dialektojn, kvankam en civilizitaj landoj ĉiu mezinstruita hemo krome scipovas la ĝenerale uzatan, nacian lingvon. Tion alceli estas la nepra devo de ĉiu konscia Flandro. Nur la ĝenerala instruado kaj aplikado de la nacia normlingvo forigos la ridindan fisituacion nun konstateblan : Flandro de la marbodo apenaŭ povas interkompreniĝi, pro la granda malsimileco de la dialektoj, kun samnacio el Limburgo ! Nacia normlingvo kaj Esperanto respektive ludas rolon analogian sur kampoj nacia kaj internacia.

Ĝis antaŭ kelkaj jaroj la dua lingvo estis instruata jam en la unuaj jaroj de la elementa instruado. Ke tio troŝarĝis la instruoprogramon, estas memkompreneblaĵo. Miaj spertoj dum lingvo-instruado ĉiutage havigas al mi novajn pruvojn pri la vereco de tiu aserto. Junaj studentoj 14-15 jaraj, ankoraŭ faras la plej gravajn erarojn dum uzo de la gepatra lingvo ! Mi ne pretendas, ke la kulpo kuŝas ekskluzive ĉe la tro frua lernado de la dua lingvo ĉar mi opinias, ke la instruoprogramo estas troŝarĝita ĝenerale. Tiel mi estas konvinkita, ke pli bonaj rezultoj estas akireblaj se la unuagrada instruado sin limigus je la tri fundamentaj fakoj : paroli, skribi, kalkuli. Sur tiuj fortikaj bazoj sin apogu poste la plua instruado i. k. la dua lingvo. Mi ĉiutage spertas, ke la instruado de la dua lingvo, kiun miaj lernantoj ricevis en la elementa lernejo, estas senutila kaj konfuziga balasto. Montriĝas ja multe pli malfacila korekti enradikiĝintajn erarojn ol eviti ilin !

Pro la nenormalaj lingvaj cirkonstancoj en nia lando, la Nederlanda normlingvo estas kvazaŭ nova al ni; post generacio ĝia uzado iĝos kutima kaj la lernado pli glata. Ni nun staras ĉe la komenco de tiu procezo. Mia konkludo : profunda kono de la gepatra lingvo plifaciligos la instruadon de dua lingvo.

E. S.

Kelkaj detaloj pri Abesinujo

(Laŭ la libro : *Abesinujo, lando kaj popolo, de Kurt Lubinski*)

Unue pri ĝia estro : La Imperiestro Haile Selassi. Li naskiĝis en la jaro 1892, kaj estas la perfekta reganto laŭ karaktero ; laŭ staturon li prezentas al ni la aristokratan orientulon. Lia vizaĝo almontras al ni parte malmolajn, parte emociigajn trajtojn, sed estas entute tre simpatia. Ordinare li estas vestita en mildefaldita silka robo, la kutima Abesina pantalono kaj malaltaj ŝuoj.

La « neguso » au reĝo, parolas de post sia infanaĝo jam la Francan lingvon. Ni, Europeanoj ne sufiĉe povas imagi, kio tion signifas en tiu lando. Por kompreni, jen kelkaj ekzemploj.

Ankoraŭ nuntempe, ekzistas en la lando potencaj reĝoj kiuj konsideras la allernon de fremdaj lingvoj kiel regnan perfidon; kaj ĉiun eŭropaniere faritan laboron kiel malinda al Orientulo. Ĉio almontras ke Haile Selassi estas la homo de la nova generacio. Liaj konsilantoj estas plejparte junuloj, kiuj, antaŭ nelonga tempo alvenis ree al sia naskiĝ-lando, post finstudado en Oxford (Anglujo). Tio signifas sufiĉe grandan progreson por lando, kies plej granda militestro dum sia tuta vivo rifuzis vojaĝadi vagonare, kaj kiu uzis ĝis sia morto kiel nuran veturilon ĉevalon, azenon au dromedaron.

La antaŭulo de la nuna reĝo, imperiestro Menelik, iun tagon ricevis la viziton de francaj inĝenieroj, kiuj, farante donacon al li, de miniatura vagonaro, celis signifi per tio la konstruadon de fervojo Franc-Abesina. Nu, la reĝo restis proksimume tri tagojn en sia ĉambro, kaj ne estis alparolebla, eĉ ne por ŝtataj aferoj : lia Moŝto ludis per la vagonareto.

Abesinanoj, kiuj en Genevo kunsidas ĉirkaŭ la tablo de la delegitoj, kompreneble ne ŝatas ke oni parolas pri la infanaĝoj de iliaj regantoj.

Neniam vidita estis la lukso kaj la festgajeco dum la kronado de la nova nuntempa imperiestro, kiu dufoje dum sia vivo akiris la titolon de « Triumfanta Leono ».

La « negus negesti », aŭ reĝo de la reĝoj de Abesinujo, estis vestita per vestaĵoj de puraj orfadenoj, la krono, kiun oni metis sur lian kapon havis valoron de dekdu-milionoj da guldenoj. Anglujo donacis al li oran sceptron ; Francujo kaj Italujo sendis kiel donacojn flugmaŝinojn, kaj Germanlando donis por eltrinki dum la festeno, okcent botelojn da Rejno-vino. Sed ankaŭ la imperiestro ne forgesis, je tiu tago, kiamaniere reganto sin igas ŝatata de sia popolo. Sidanta sur sia ora trono, li disdonadis al la infanoj, plene, arĝentajn, sonorajn Maria-Theresia-monerojn. Eĉ Rockefeller, en Ameriko, tion nur faris per nikelaj moneretoj.

Pri bonaj manieroj dum manĝado

En Abesinio okazas unufoje dum la jaro festo de la grandaj manĝadoj kaj trinkadoj, kiuj daŭras unu semajnon. Oni tie ne uzas

LA PLEJ FAMAJN
VERKISTOJN
esperantistajn vi ekkonos
abonante la revuon LITE-
RATURA MONDO

je unu jaro por 65 Fr.

Specimeno : 2 Fr.

La plej detalajn kaj objek-
tivajn librokritikojn vi tro-
vas en LINGVO-LIBRO
kvaronjara aldono al Lit.
Mondo.

Abonojn akceptas kaj spe-
cimenojn sendas :

Flandra Esperanto-Instituto

Magdalenast., 29, Kortrijk (p.k. 326851)



*Ĝripa por' pomare ĵetas:
Vi prenas, ni forgesas.
Ĉu Mo-libro - ĵen rimedo
Vin skavaci sen akcedo.*

telerojn, forketojn, tranĉilojn, k. t. p. Sed ankaŭ la popolo, kiu manĝas per la fingroj, havan sian specialan etiketon. Ĉiu manĝas el unu komuna plado ; tio el si mem jam postulas iun kvanton da taktio. Nu, jen kelkaj reguloj ĉe-table :

1. — Kiam servisto, antaŭ la manĝado, per kruĉo ŝprucas akvon super viaj manoj kaj aldonas sapon, nur prenu malmulton de ambaŭ ; unue ĉar tiuj du aĵoj estas multekostaj, due, oni povus pensi ke viaj manoj efektive estas malpuraj.

2. — Kiam la manĝaĵoj estas surservitaj sur la tablo, tiam elektu vian sidlokon, sed ne prenu ion de antaŭ la nazo de via najbaro.

3. — Nur uzu tri fingrojn de via dekstra mano, kaj tute ne estas konvene, meti ilin kune kun la manĝaĵo en vian buŝon.

4. — Kiam la servistino metas la kokidaĵon sur la tablon, tiam pacience atendu, por servi vin, ĝis ŝi, kun siaj malhelaj fingroj, forigis la viandon de la ostoj.

5. — Se malgraŭ tio, vi ankoraŭ trovas osteton, tiam per via malgranda fingro de via dekstra mano ĝin prenu, kaj per via dika fingro kaj montra fingro, tiru la viandon for de la ostoj : ofte tio helpas.

6. — Restaĵojn oni ne lasu sur la komuna plado, sed ŝovu ilin sub ĝin.

7. — Alia viando pendas super la tablo. Por sin servi oni plantas siajn dentojn en la granda peco da viando kaj per la komuna tranĉilo oni tranĉas de ĝi, tranĉante laŭlonge de sia nazo, la deziritan pecon.

Esperanto in de scholen

Esperanto is een wereldhulptaal die dienen moet om de betrekkingen tusschen de verschillende taalgemeenschappen te vergemakkelijken. Het is met Esperanto als met de telefoon : zoolang slechts enkelen dit hulpmiddel kennen en gebruiken is het praktisch nut gering ; naarmate hun aantal stijgt, stijgt ook het gebruik en bijgevolg het praktisch nut. Daaruit volgt dat Esperanto slechts ten volle zijn doel zal bereiken als allen die belang stellen in, of belang hebben bij internationale betrekkingen, deze taal kennen en gebruiken.

Om dit doel te bereiken bestaan in alle landen Esperanto-vereenigingen die door de propaganda en het inrichten van kursussen deze taal verspreiden. De werking dezer Esperanto-vereenigingen is van het grootste belang, doch ze kan de algemeene en definitieve oplossing niet brengen. Om tot deze algemeene en definitieve oplossing te komen is het noodig dat Esperanto onderwezen worde in de scholen. Inderdaad slechts dan zal Esperanto zijn einddoel bereiken.

Werd er op dit gebied reeds wat bereikt ?

In ons land weinig, slechts een proeve te Verviers en in een blindgesticht te Brussel.

Wat het buitenland betreft werd Esperanto reeds in meer dan dertig landen in de scholen ingevoerd, hetzij fakultatief, hetzij verplichtend. Wij wenschen hier geen statistieken te geven, enkel aanmerken dat Frankrijk ongeveer aan de spits staat ; in Engeland wordt voor de invoering van Esperanto in de scholen geijverd en werden reeds schoone uitslagen bereikt ; onlangs nog werd ook in Denemarken de toelating verleend om Esperanto op de school te onderwijzen.

Hiervoor komen niet alleenlijk de lagere scholen in aanmerking maar ook de middelbare-, bijzondere- en voornamenlijk de handelsscholen. Een drietal universiteiten hebben reeds een leerstoel voor Esperanto opgericht.

Door den volkenbond werd in 1921 een commissie aangesteld die voor taak had de Esperanto-beweging te bestudeeren voornamenlijk in betrekking tot het onderwijs. Het verslag dezer commissie, uitgegeven door den Volkenbond, was — zelfs voor de Esperantisten — een veropenbaring.

Het vraagstuk « Esperanto in het onderwijs » heeft twee zijden nl. de noodzakelijkheid Esperanto in de scholen te onderwijzen en het nut van Esperanto voor het onderwijs. De tweede zijde is voorloopig van overwegend belang. Inderdaad, de leidende persoonlijkheden op onderwijsgebied en de schoolbesturen zullen er gemakkelijker in toestemmen Esperanto op den uurrooster te plaatsen, ingeval ze overtuigd zijn dat de kennis en het gebruik der internationale taal werkelijk een invloed ten goede kan uitoefenen op onderwijs en opvoeding in 't algemeen.

Dezen invloed te bestudeeren en bekend te maken is vooral het werk van vereenigingen van onderwijzers-esperantisten. Willen we dat Esperanto in ons land meer algemeen verspreid zal worden dan is het noodig dat de onderwijzers-esperantisten in Vlaanderen in die

zin handelen. Daarom werd, als afdeling van den Vlaamschen Esperantisten Bond, de vereeniging van onderwijzers-esperantisten gesticht. De taak dezer vereeniging zal hierin bestaan de invoering van Esperanto in de scholen voor te bereiden en door te voeren.

H. Rainson.

Somera Vento

de
CHARLES KEELER

Senfina golf' brilega je argento,--
Soleca Alkatraz',-- Pordego Ora
Nebulvualita,-- San-Francisko glora,--
De Tamalpajs profil' en okcidento,---

Dum tiu vido, ĝuas mi reveme
Sur tankolora supro vagadante
De l'monto en somer' --- jen flustras ĝeme
La mara vent' tra seka herb' pasante.

Ho vi senlaca Pacifika vento,
Ne sonu tra l' somer' la voĉo plora ;
Sturnela kant' ĝojfajfas flut-sonora,
Kaj mi kunkantas, malgraŭ korpremsento,---

Car amon, kiel venton, rapidigas
La sorto, ĉiam urĝe pluinstigas.

Esperantigis Fred L. Wharff.

(*) Sturnelo : Usona kampa birdo (*Sturnella magna*) kun rave melodia kanto.

Nia noveleto

La Pomo de..... Alma

de
POL VAN DER POEL

Temas pri pomo, sed ne estas la pomo de Evo, kvankam la historio, kiun mi volas rakonti al vi, iomete similas al tiu, kiun Moizo verkis en tiel malproksima tempo.

Mi ricevis pomon, delogan, ruĝan pomon de ĉarma knabino, kiam je la komenciĝo de la milito 1914-1918, mi forvadis al urbeto de Okcidenta Flandrujo, kaj tie restis dum ok semajnoj.

Pro la vereco, mi tuj diros ke mi ne ricevis unu pomon. Mi dum tiuj ok semajnoj eble ricevis dekduon, sed tio ne gravas.

La donacintino de tiuj pomoj dekdujara kiel mi, estis, mi ripetas ĝin, gaja, ĝentila, knabino kun longaj nigraj haroj, kaj grandaj, nigraj okuloj.

Ni loĝis en monaĥinejo kie ankaŭ estis lernejo, kaj dum tiuj militaj feriaj tagoj, la junaj knabinoj de l'proksimaĵo, ĉiun tagon venis

al la lernejo por longe preĝi en la kapelo de la monaĥinejo, por ke Dio kompatu pri la malpaca homaro.

Nur venis keljah tre junaj knabetoj de la juninfana lernejo, kaj mi, kiel knabo, enloĝanto de la monaĥinejo, estis do la nura « viro » inter la knabinoj.

Nekomprenebla simpatio min instigis al la nigra-okula knabino, kaj la simpatio certe estis reciproka, ĉar kiel mi jam diris, ŝi donacis al mi ... pomojn.

Sed... sed... unu el la severaj monaĥinoj, fratino Kordula, eble jam timis por mia « senkulpeco », kaj volante defendi min kontraŭ la diablo, la mondo kaj la karno, ŝi malpermesis al mi estadon kun mia amikino. Nur ŝtele mi ankoraŭ dufoje ricevis pometon, sed tiam la ok semajnoj jam estis preteraj, kaj ni reiris al nia hejmo, kiu Dibenate ne estis detruita.

— * * *

La milito daŭradis, la vivo ne haltis, kvankam en tiu malgaja tempo, ĝi ŝajnis nur rampi kiel limako.

Ni manĝis malbongustan malsanan panon, margarinon, fremdan lardon, nigrajn fabojn, kaj aliajn militajn varojn, kiuj havis specialan familinomon : lardo de la nutrajkomitato, sukero de la nutrajkomitato, faboj de la nutrajkomitato, ĉio, ĉio ... de la nutrajkomitato ... Ni lernis kontrabandi. Ŝtele ni iris aĉeti terpomojn ĉe la kamparanoj, kaj kaŝis nin por la germanaj soldatoj.

Intertempe mi jam legis kelkajn romanojn de la Flandraj verkistoj Hendrik Conscience kaj August Snieders, kaj kiam en « La Fera Tombejo » de H. Conscience, mi legis pri knabo kaj knabino, kiuj kune hejmeniris el la lernejo, tiam tre nature en mia imago mi vidis min kaj Alma revenantaj el iu imaga lernejo. Klara restis ŝia bildo en mia spirito, kaj, ĉar mi opiniis ke ŝi estis bela kaj ĉarma, kompreneble ŝi ankau iĝis la plej bela heroino de ĉiuj noveloj kaj romanoj, kiujn mi legis. Kiam malbona homo en tiuj libroj malpermesis ke la knabo amis belan knabinon, mi denove sentis la ĉagrenon pro la malpermeso de la monaĥino.

La anekdoto pri la pomo de Alma vivadis en mi kiel bela legendo, io, kiel la rakonto pri la « Du reĝaj Infanoj ». La disigo tamen ne iĝis ĉagreno, mi ne malespere deziris ŝin vidi.

Kaj fine ankaŭ la sanga milito finiĝis. Malrapide la tempo normaligiĝis. Denove ni manĝis blankan panon, denove la vendado de terpomoj, butero, sukero liberigiĝis. Denove la homoj lernis ridi kaj ĝoji.

Je bela tago dum la somero 1919 mi ree vojaĝis al la okcidenta flandra urbeto. Mi dankeme vizitis la bonajn monaĥinojn, kiuj en terura horo nin nutris kaj loĝigis.

Goje mi rimarkis ke almenaŭ la familio de Alma ĉiam loĝis en la sama domo. Guste estis publika vendotago, kaj mi promenadis tra la multaj tendoj, sub kiuj oni vendis ĉion, kion la homoj bezonas en la multaj diversaj okazintaĵoj, kiuj formas la vivon...

Sed mi ne atentis pri tiu aro da kriaŭtaj gevendistoj. Subite deziro levigis en mi. Nun mi ne plu estis infano, kaj eble Alma estis alloga ol en la pasinteco...

La bildo de l' knabino tre klare estis filmata en mia intelekto, kaj mi certe rekonus ŝin. Miaj okuloj serĉis ... serĉis ... Mi denove pre-

Enhavo Jarkolekto 1936-1937

ORIGINALAJ PROZAJOJ

BLEIER, V. :		
Intervjuo kun Jolan Földes	...	137
CNOPS, L. :		
Loveno	...	106
TOTSCHE, L. :		
Baghy kaj K. Kalocsay	...	39
VAN DER POEL, POL. :		
Desiderio Erasmo	...	23
Cseh-kursa anekdoto	...	37
En Leuven regas la plezur	...	107
Loveno tra la jarcentoj	...	116
La sep mirindaĵoj lovenaj	...	150
Leuven-universitato-studentoj	...	132
Promenante tra Loveno	...	168

ORIGINALAJ POEMOJ.

SOLC, K. :		
En la klaso	...	187
Flandraj studentoj	...	187
VAN DER POEL, Pol. :		
Printempa legendo	...	154
Majo	...	170

TRADUKITAJ PROZAJOJ.

STREUVELS, Stijn. :		
Aŭtuno (trad. de D. Mortelmans)	...	57
SENNOMAJ :		
Kvin en unu (trad. Taylor Frank)	...	22
La Izerturo en Diksmuide (trad. Samijn Paŭlo)	...	154
Pli ol 7000 studentoj vizitis la Izermonumento (trad. Marcel Termote)	...	72
La amuleto (trad. Vander Steen, Jos)	...	44
VOLTAIRE :		
La unuokula ŝarĝoportisto (trad. Verheyden, Edg.)	...	53

FLANDRA RAKONTO.

DE GROOTE, Achiël :		
La sorĉdancejo	...	70

ESPERANTA MOVADO.

1/ TUTMONDA :

ACKAERT, A. :	
Heeft de wereld een hulptaal noodig ?	69
BROODCOORENS, G. :	
Argumentoj por Int. Diplomatia lingvo	25
Adiaŭletero el Germanujo	35
CORTVRIENDT, E. :	
Esperanto op Radiogebied	45
Grava Dato	81
Esperanto in het onderwijs	115
ESPERANTO EN GERMANUJO	
124	
JEVA - Ĉu vi povas varbi por Esperanto ?	
21	
LODEMA, A. :	
La verdlandanoj kongresas	163
RAINSON, H. :	
De Handelskamer van Parijs en het Esperanto	19
Esper. en de handelsfooren in Frankrijk	51
Ligkunveno	82

2/ FLANDRA :

AUSKULTEMULO :	
Dumkongresaj travivaĵoj	11
CORTVRIENDT, E. :	
Sur la sojlo de la nova jaro	5
Ni rikoltu	97
Onze organisatie	129
8a Flandra kongreso de Esperanto 102 - 131 - 150 - 161 - 179	
Flandra ligo esperantista 6 - 65 - 100 - 131 - 147	
G. D. :	
Esperanto en Flandrujo	145
H, V, D. :	
Al niaj gelegantoj	35
LODEMA A. :	
Amiko Jan van As 60 jara	89
Post la kongreso	10
RAINSON, H. :	
Kion celas ni ?	3
Bileto de la prezidanto	166
THIEN, H. :	
Mia rondvojaĝo en Flandrujo	7
La Flandra kongreso	10

DIVERSAJ ARTIKOLOJ.

ANGULO de la serĉemulo	16 - 31 - 48 - 63 - 79 - 96 - 111 - 127 - 143 159 - 175 - 191
ALVOKO	122
BIBLIOGRAFIO	12 - 36 - 61 - 76 - 126 - 139 - 157 139 - 157 - 190
CORTVRIENDT :	
Esperanto in dienst der wetenschap	186
CI vi scias	71
DISTINGO	90
DIVERSAJOJ	12 - 27 - 46 - 59 - 73 - 91 - 125 139 - 171 - 187
ESPERANTO in de praktijk	4 - 17 - 34 - 50 - 68 - 83 - 98 83 - 98 - 114 - 146 [130 - 162 - 178
FEDERACIO de geinstruistoj esperantistaj	153 - 167
FISHER, Henriko :	
De gelukkige dorpeling	93
GRATULOJ	10 - 26 - 63 - 76 - 140
GRUPA VIVO	13 - 30 - 47 - 62 - 78 - 94 - 109 - 127 - 140 - 158 [172 - 191
JEVA - Pri oficiala lingvo en Belga Kongo	90
JUBILEO Andreo Cseh	88
KOMUNIKOJ	17 - 33 - 49 - 65 - 113
LAPONA vivo modernigita	73
L. E. : Als men verre reizen doet	123
MOMENTON ni ridu	92
NEKROLOGO	92 - 140
PRAGANO, Sigismundo :	
Esp. en la lernejo	86
PRIPENSU la vortoj de Sta Augustino	35
PRI la olimpiado en 1940	71
RAINSON, R. :	
Over Esperanto	4
Een merkwaardig boek	85
SCHIGO	139
SCIIGOJ de la lingva komitato akademio	71
STUIT, S. : Por komencantoj	156
SUBTENO por la revuo	47 - 74 - 109 - 126 - 140 - 157
VAN DER POEL, Pol. :	
Hei Ei van Columbus	135
VARBU novajn abonatojn	104
VAN SUCHTELEN, Nico :	
Fragment uit Tat Tvam Asi (over Esperanto)	150
VERHEYDEN, Edg. :	
Pri kriminala juro	120
VERNIEUWING DER ABONNEMENTEN EN BIJDAGEN	177

ILUSTRAJOJ.

Julius Baghy	39
Andreo Cseh	88
Kolomano Kalocsay	41
Loveno :										
Preĝejo Sta Mihaelo	117
Granda Beginejo	119
Henk Thien	9

terpasis ŝian hejmon, mi denove trairis la longan straton plena je amaso da homoj.

Kaj jen, ĉe fruktovendisto mi efektive opiniis rekoni la knabinon, aĉetante pomojn ... Belajn, ruĝajn, ruĝajn pomojn, kiel mi ricevis el ŝiaj manoj antaŭ kvin jaroj.

Jus la knabino turnis la kapon ... sed ho ve ! Ŝi tute ne estis la ideala bildo, kiun dum tia tempo mi konservis en mia spirito ... Jes, la okuloj estis nigraj, la hararo estis nigra ... Sed la tuto nuna ne plu vekigis mian entuziasmon.

Kvankam seniluziigita mi alproksimiĝis la fraŭlinon, nur scivolema konstati ĉu mi ne eraris.

— Bonan tagon, fraŭlino ... Se mi ne eraras Vi estas Alma d. J. ĉu ne ? Ŝi alrigardis min iom strange.

— Jes estas mi, sinjoro.

— Eble vi ne rekonas min ... Sed pensu dum momento ... Antaŭ kvin jaroj, vi diversajn fojojn alportis pomojn al knabeto, rifuĝinto el L..., kiu kiel Vi preĝis en la monaĥinejo por la fino de la milito...

— Jes, mi rememoras ... Estas ja terura tempo... Feliĉe ĝi pasis.

— Jes, feliĉe... Kaj nun estas la unuan fojon ke mi revenas ĉi-tien. Sed mi multfoje rememoris la malpermeson de Fratina Kor-dula, kiu ne volis ke ni kunvenis por ludi sur la monaĥineja ludejo.

— Jes, mi rememoras ĝin, ŝi ridetis.

Tiun-ĉi fojon ŝi tamen ne prezentis al mi ... pomon. Eble ke ankaŭ mi estis seniluziigo por ŝi.

Mia scivolemo estis plenigita, tio sufiĉis, ĉar ververe, Alma ne estis sufiĉe bela kaj ĉarma, por ŝajni al mi tiel teruraj aferoj kiel la diablo, la mondo kaj la karno ... Kaj senĉagrene mi revojaĝis hejmen. La efektiva Alma ne plu interesis min ... Sed la iluzia bildo de la juna, ridema knabino restis ; kaj mi klopodis ĝin pentri tiel eble plej fidela.

Por komencantoj

Ĉiu konas fabelojn kiuj parolas pri magia objekto kiu donas al la posedanto valoraĵojn. Li nur bezonas diri certan frazon aŭ rimon kaj la magia objekto funkcias : kokino kuŝigas oran ovon aŭ tablo kovriĝas per bongustaj mangaĵoj aŭ muelilo muelas iu ajn kion oni deziras k.t.p. La posedanto denove diras kelkajn vortojn kaj la magio ĉesas. Fine la objekto falas en la manojn de persono kiu ne konas la ĝustan frazon kaj anstataŭ komforton ĝi alportas malagrablaĵon, anstataŭ feliĉon, malfeliĉon.

Nun mi rakontas al vi pri tute moderna magia objekto kiu donis antaŭ dek jaroj malagrablan surprizon al bakisto en malgranda urbo en Nord-germanujo. Unu matenon li ĵus estis enmetita en la fornon bulkojn kiam oni anoncis al li ke lia amiko estis antaŭ lia domo kun bela ĵus aĉetita motorbiciklo. Li tuj iris en la straton kaj multe admiris la novan veturilon. La amiko klarigis al li detale la funkciigon, montris al li la levilojn dume la bakisto atentege aŭskultis kaj kvazaŭ karesis la motorbiciklon per siaj okuloj.

« Cu vi ŝatas provi veturi per ĝi » demandis la amiko.

« Volonte, volontе », respondis la bakisto.

Li aŭskultis ankoraŭ unufoje la klarigojn, obeis la ordonojn kaj jen li estis for. Sed, ho ve ! Li ne scias kiel haltigi la modernan

maŝinon ! Ciam rekte antaŭen sur la ŝoseo li veturas. Stranga aspekto, ĉar li estas vestita per blanka ŝirmantelo kaj blanka bakist-ĉapo. Li pasis vilaĝon post vilaĝon kaj fine sen akcidento alvenis en urbon 60 km. for de la sia. Fine la magia objekto haltis ĉar ĝi ne plu havis benzinon.

La kroniko tute ne raportis pri la hejmvreveno de la bakisto kaj la motorbiciklo. Mi ankaŭ ne povas sciigi al vi ĉu la bulkoj intertempe brulis aŭ iu savis ilin.

ERNA RIECKMANN-SINDHWAD.

Diversaĵoj

ERRATA. — En la antaŭa numero de F. E. la financaj raportoĵoj pri *Flandra Esperantisto* kaj pri *Flandra Ligo Esperantista* aperis ambaŭ sub la titolo : Financa raporto pri Flandra Ligo Esperantista. Niaj atentemaj legantoj sendube mem korektis la eraron.

FLANDRAJ NACIAJ KANTFESTOJ (VI. Nat. Zangfeesten) Dimanĉon, la 25-an de Julio venonta, okazos sur la unike bela granda placo de Brussel la 5-aj Fl. Naciaj Kantfestoj. La anoj de F.L.E. kiuj partoprenas la kantfestojn, renkontiĝas tiun tagon en « Breughel » 37 Em. Jacquainlaan, je la 2-a posttagmeze.

* * *

Dimanĉe, la 30-an de majo, estis en Wevelgem la finfesto de la esperanta kurso, kiu donis Sinjoro NIKO DEGRAAN.

En la sama festo estis ankoraŭ tombolo. Lotoj vendiĝis ĉie. Kelkaj gajnoj ne estas ankoraŭ transdonitaj.

La gajno-numeroj estas la sekvontaj :

- | | |
|----------------------------|---------|
| 1. La infanoj de Betlehem | N. 567 |
| 2. La du amatinoj | N. 667 |
| 3. La verda koro | N. 668 |
| 4. Sur la verda vojo | N. 943 |
| 5. Leerboek voor esperanto | N. 1042 |
| 6. La du amatinoj | N. 1324 |
| 7. Kesteto da cigaroj | N. 1328 |
| 8. Sur la verda vojo | N. 1449 |

Tiuj gajnoj restas disponeblaj ĝis la 15-an de julio. Post tiu dato, ili apartenos al la grupo « Per esperanto al mondpaco », kiu organizis la finfeston.

Se iu havas loton kio estas gajnata, li skribas al CLAUS LEOPOLD, Hoogweg, 14, WEVELGEM.

Bonvolu meti en la leteron, la bileton gajnantan.

* * *

ESPERANTISTA LINGVA KOMITATO KAJ AKADEMIO.

Paris, la 3-an de Majo 1937.

Por forigi eblan konfuzon, la Akademio sciigas, ke la *Oficialaj Lingvaj Institucioj* tute ne okupiĝis, kaj sekve neniel respondecas, pri la verko de ĝia aŭtoro titolita : *Oficiala Vortaro de Esperanto*, publikigita de Sro Grenkamp-Kornfeld.

* * *

KURSGVIDANTOJ atentu! Ni helpas al vi dum la kurso kaj sendos donacon por viaj lernantoj. Skribu al K. Kalocsay, Hungarujo, Budapest VIII. Maria-u 34.

* * *

6-a KOMERCA FOIRO EN KORTRIJK.

Por la sesa fojo okazas komerca foiro en Kortrijk.

La loka grupo decidis partopreni al ĝi kaj disponas pri bone lokita stando. La nombro da vizitantoj ĉiufoje pligrandiĝas tiel ke la propaganda efiko certe estos grandega.

Tiukaze la Kortrejkaj gesamideanoj deziras aranĝi esperantistan tagon kaj kunvokas ĉiujn por grupa vizito al la foiro, dimanĉe 8-an de aŭgusto, je la 3-a posttagmeze. Dum laborkunveno de F.L.E. estis dirite ke preskaŭ la duono de la liganoj loĝas en Okcidenta Flandrujo, ni montru ke nia aktiveco estas proporcia al nia nombro kaj tial ĉiuj gesamideanoj el la tuta regiono devas senescepte rezervi tiun daton por rendezuo en Kortrijk.

La foiro okazos en la Kolegio Sankta Amando, de la 8-a ĝis la 15-a de aŭgusto. Ne nur la Esperanto-stando sed la tuta ekspozicio estos alloga; Kortrijk estas la centro de la linindustrio kaj la foiro prezentas la eblecon al profanuloj por vidi en aktiveco la diversajn maŝinojn uzitajn en tiu grava industrio.

Dum la sama monato oni festas la jaran kermeson, do vi trovos la urbon en gaja atmosfero. Esperanto-stando, ekspozicio, kermeso, aŭgusta somervetero, kiun allogaĵon vi deziras plie? Notu do bone la daton: 8 aŭgusto 1937!

* * *

Denove aperis 4 numeroj de la serio « Muusses Esperanto-Biblioteko »:

Tra Usono kun Ruliĝanta Hejmo — J. Scherer.

El la Klasika Periodo de Esperanto — J. Glück.

Kongresaj Paroladoj — D-ro L. Zamenhof.

Kongresaj Paroladoj — D-ro L. Zamenhof.

Ĝis nun aperis jam 7 numeroj; ĝis Aŭgusto eliros 3 pluaj volumetoj, tiel ke je la komenco de la Jubilea Kongreso la unua serio estos tute preta.

La tuta serio da 10 broŝuroj kostas 41 fr.; unuopa numero kostas 5,80 fr. Detala prospekto estas havebla ĉe Flandra Esperanto-Instituto.

El la jarraporto de Flandra Ligo rezultas ke preskaŭ neniu sekcio posedas notindan libro-kolekton. Jen okazo por akiri nemultekostan kaj valoran legaĵon ne nur laŭ literatura sed ankaŭ laŭ dokumenta vidpunktoj.

Laŭsperte ni scias ke la Flandraj samideanoj montras bedaŭrindan indiferentecon rilate la E-literaturon; la nombro de tiuj kiuj konsentas iom elspezi por persona biblioteko estas sensignifa. Jen io por ili!

Al multaj sekcioj mankas temoj por rakont-vesperoj. La MEB-volumeto donas solvon: La klubo regule abonu la Bibliotekon; ĉiu ano elektu unu numeron, trastudu ĝin kaj, post interesa prelego, ricevu ĝin rekompence.

Internacia Semajno Amsterdam

22-28 Augusto 1937

DIMANCO. — Alveno — al la hotelo — vespermanĝo — interkonektiĝa vespero.

LUNDO. — Promenado en la centro de la urbo — lunĉo — vizito al la Rembrandt Muzeo — vespermanĝo — teatro.

MARDO. — Vizito al la ŝtata muzeo (Rembrandt — Jan Steen — Frans Hals — Vermeer — Gerard Dou. kpt.) — lunĉo en la Vondelparko — vizito al Schiphol (aerodrome) — vespermanĝo — klubkunveno Amsterdama grupo.

MERKREDO. — Vizito al la urbeto Volendam kaj la insulo Marken — lunĉo en Volendam — vespermanĝo — boatekskurso tra la kanaloj de Amsterdam.

JAŬDO. — Aŭtocârekskurso tra la tuta urbo — lunĉo — vizito al la Kolonia Instituto — vespermanĝo — vesperekskurso al la banloko. Zandvoort.

VENDREDO. — Tuttaga ekskurso al la fromaĝfoiro en Alkmaar. Tien boate reen vagonare. Vespermanĝo — vespere libera.

SABATO. — Vizito al Hago. Pac-palaco. Lunĉo — vizito al la banloko. Scheveningen kun enmara ponto — vespermanĝo.

DIMANO. — Vizito al la preĝejo kaj dimanĉa foiro — lunco — fino.

La septaga restado laŭ ĉi supre programo inkluzive ĉiujn manĝojn, vizitojn, ekskursojn, trinkmonojn, tranoktojn, kpt. estas f. 55.—; ĉe tranoktado en la kumunuma hotelo (ĉambroj kun 4—20 litoj) f. 40.—.

Aliĝojn oni sendu plej laste ĝis la 1a de Aŭgusto al la Turistoficejo L.E.E.N. Rokin 57, Amsterdam-C. (Ĝirpoŝtkonto 2628765).



La anoj de «Paco kaj Justeco» sekcio Brugge de F.L.E.

Bibliografio

(Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol Redakcio, Administranto aŭ Flandra Esperanto-Instituto estos ignorataj.)

LA JUNA VIVO. — « INTERNACIA KANTARO ». 64 paĝoj 12 × 15 1/2. 34 kantoj muziknotoj aldonitaj. Prezo 0.35 gld. aŭ Fr. 5.50 West Grafdyk (N.H.) Nederlando. Apenaŭ la « Internacia Lernolibreto » pasis, jen nova eldonaĵo : « Internacia Kantaro ». Kiel ni legas en la antaŭparolo, la libreto formas nur kolekton da kantoj, kiuj jam aperis en la monata organo de la « Juna Vivo ». Estas feliĉa ideo prezenti tiun kolekton sub la nomo internacia, ĉar vere oni ne povas nei ĝian varian enhavon. Kantoj el deko da landoj. Konataj melodioj. Nomoj kiel Schubert, Beethoven, ne bezonas klarigojn. Troviĝas ankaŭ kelkaj malnovaj flandraj popolkantoj. Pri la tekstoj tradukitaj aŭ novaj vortaranĝoj en Esperanto atestas la nomoj de la tradukintoj. Speciale ĝojiga por ni flandroj estas la ofta renkonto de nomoj kiel J. Van Schoor, J. Karnas, E. Sindhwad. Ne nur al komencantoj kaj junuloj la kantlibro servu, ankaŭ niaj grupoj uzu la libreton dum siaj vintraj kunvenoj. Ni nur povas deziri ke la « Internacia Kantaro » trovu internacian disvastigon.

LA VOJO, *poemo de D-ro L. L. Zamenhof, muziko (kanto kaj fortepiana akompano) de René Deshayes. Tria eldono. Reeldonis Esperantista Centra Librejo, 11 rue de Sèvres, Paris. 2 fr. fr.*

Reeldonante tiun belan kanton, la Esperantista Centra Librejo kredas fari gravan servon al la sciemuloj pri la historio de nia lingvo, same kiel al la amatoroj de bona muziko, kaj alporti ankaŭ valoran helpilon por la propagando de Esperanto en la artaj rondoj.

Grupa Vivo

AALST. PIONIRO.

La Ĉsehkuro de Sano. Henk Thien finis la 30 an. de Majo. Pioniro aranĝis konversacian kurson por ke la novaj Esperantistoj aliĝu al nia grupo. Ses el ili jam aliĝis al nia grupo. Ni kunvenas de nun ĉium Jaudon anstataŭ Merkredon, ĉar tiu tago estas pli oportuna par ĉiuj.

ANTVERPENO. FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

La pasinta monato estis riĉa je... biciklaj ekskursoj. Al Maria-burg, Bouwel, Schilde. Cie flirtis niaj flagetoj. Tiuj dimanĉaj ekskursoj tamen ne malhelpis la ĉeeston al niaj semajnaj kunvenoj. Estis preparolata precipe la pli intensa propagando en la ĉirkaŭaĵo de nia urbo.

Tiucele okazos pli oftaj renkontiĝoj de niaj agemaj membroj en la domo de nia prezidanto. Multaj gesamideanoj ĉeestes la rŝgionan kunvenon okazinta en nia urbo la 13an. de Junio. Venis gesamideanoj el Mechelen, Leuven kaj Mol (60 Km. ! tiuj lastaj foriris je la 5a. matene). Antaŭ tagmeze ni kunvenis en nia ejo, interkonatiĝis kun la novaj esperantistoj el Mol, preparolis diversajn punktojn kaj... kantis. Posttagmeze ni kune iris al St. Anna.

Finiĝis la kurso gvidita de nia prezidanto. Multaj lernantoj uruafoje ĉeestis nian merkredan kunvenon. Cu ni povas esperi ke ili daŭre trovu la vojon al nia klubo ?

La 19an. de Junio multaj el niaj membroj ĉeestis la prelegon de la pola samideano Grenkamp, kiu parolis pri Polujo kaj precipe pri Varsovio, la urbo de la nunjara Universala Kongreso. Vere, ĝuoplena vespero.

BRUSSEL. N.E.L.E.

La 23-an de Majo, okaze de la Amnesti-manifestacio, ni havis la plezuron saluti en nia ejo (kiu samtempe estas la sidejo de V.O.S.) multajn liganojn de pluraj sekcioj. La estraranoj kaj la diversaj delegitoj partoprenis la imponan manifestacion marŝante kun la ceteraj delegacioj de la Flandraj kulturorganizoj.

La 3-an de Junio nia sekcio jarkunvenis. Post voĉlegado de la diversaj raportoj kiuj atestas pri nia aktiveco kaj pri la sana situacio de niaj financoj, la estraro estis senŝanĝe reelektita. Kiel pasintjare ĝi konsistas el s-anoj G. Broodcoorens prezidanto, E. Cortvriendt sekretario, A. Ackaert protokolisto, s-anoj E. Sindhwad kasistino kaj I. Druant komerca kasistino-bibliotekistino.

Jaŭdon, la 10-an de Junio, ni organizis distran vesperon, malgraŭ la varmego 30 personoj ĉeestis kaj aŭdis i.a. interesan paroladon pri Nederlanda Hindujo de Ĉe-instruisto F. W. Bunting el Batavio.

Antaŭ kelkaj semajnoj ni estis, kiel ĉiujare, invititaj de la provincestraro por partopreni en la senpaga librodiskonado rezervita al la kulturorganizoj. Tio ebligis al ni denove elekti belan kolekton da E-libroj kiuj pliriĝigis nian jam enviindan bibliotekon.

GENT. ROELAND.

La 12-an de Junio kunvenis en Gent la anoj de F.L.E. kaj fondiĝis nova sekcio sub la nomo « Roeland ». Tuj post la daŭriga kurso, gvidata de s-ano H. Thien, instruisto de F.L.E., nia rondo kunvenos regule ĉiusemajne en « Eleckerlijck ».

KORTRIJK.

La sekcio denove tre vigle vivas. Pasintan vintron 2 Cseh-kursoj; 28 ekskursintoj al la Lovena kongreso; 36 partoprenintoj al la festo en Vichte, kaj proksimume sama nombro al Wevelgem; bicikla ekskurso al Ruisselede sed kiu pro malbona vetero atingis nur la urbon Tielt.

En Decembro, la sekcio festos sian 10-jaran jubileon; tiuokaze ĝi volas havi la plej grandan membronombro el la sekcioj de Flandra Ligo; ĝi nun havas 56 anojn, ĉiuj aliĝintaj al la Ligo.

LOVENO. — « LA NOVA TAGIGO ».

Post la kongreso, ŝajnas ke nova spirito eniris la grupon. La kunvenoj estas multe pli regulaj ol antaŭe, ankaŭ la spirito de tiuj kunvenoj estas pli bone. La plej grava okazintaĵo estas la reorganizo de la grupo. Tiu reorganizo komencis la 25an de Majo kaj ne jam estas finita. Unue venis la reakcepto de la statutoj, kiuj nun estas multe pli ampleksaj kaj detalaj ol antaŭe. Poste venis la re-elekto de la grupestraro. Oni aldonis du novajn funkciojn : Vic-prezidanto kaj Bibliotekisto. Post elektado, baloto kaj re-baloto, oni fine tiel elektis la estraron :

Prezidantino : S-ino Dekesel. Vic-prezidanto : S-ro F. Frantzen. Sekretario : S-ro L. Cnops. Kasisto : S-ro H. Cuypers. Bibliotekisto : S-ro K. Iestas.

Depost nun la korespondataĵoj por la grupo estu do sendataj al la adreso : Broekstraat, 21, HEVERLEE.

La detalaj aferoj estas nun en re-organizo.

Depost nun ni ankaŭ malfermis ŝparkason por la kongreso. Sajnas ke tiel oni povas plialtigi la nombron de la ĉeestantoj al la kongreso.

RONSE. — « *LA PACA STELO* ».

Amikoj el Ronse !! Nova jaro komeniĝas por ni, Grava jaro antaŭvidiĝas, labora jaro multe postulas !!

La 7-an de la nuna monato ni havos nian « ĝeneralan kunvenon ». « Estas ekzakte ok jaroj ke nia grupo ekzistas kaj ke ni komencos nian naŭan jaron. Tiu dato estas memorinda por la loka movado kaj plie ni volas meti grandan ŝarĝon sur viajn ŝultrojn. Ni bezonas almenaŭ kvindek tutnovajn elementojn por nia kurso donota per Sro Sole !! Ni ripetas : 50.

Kiam ĉiu nova kaj malnova grupano (in) o plenumos sian honestan, sian moralan devon, ni havos tiun nombron, eĉ pli. Al vi nun, por montri al la Ronsa publiko ke ni bezonas ilin absolute, ĉar ni devas antaŭeniri al nia dujarkvino, kaj tiam, ja tiam, ni ĝin festos kune kun niaj 100 gemembroj, kiujn ni bezonos, kiujn ni havos kaj kiuj ĉeestos.

Karaj « Pacaj gestelanoj » relegu tiun artikoleon kaj prenu decidon ĉar de vi dependas, nur de vi por ke tiu-ĉi propono iĝu realeco.

Estraraj gemembroj, pacifistaj kaj laboremaj gemembroj antaŭen, neniu restu hejme je la 7a de Junio (merkredo), ĉiuj senescepte ĉeestu la ĝeneralan kunvenon en kiu vi manifestacios ke jes aŭ ne ni atingos nian nombron por la Cseh-kurso, ni atingos nian nombron por la DUJARKVINO. Gis baldaŭ.

VICHTE.

En la komunuma lernejo okazis finfesto por la lernantoj de la kursoj el Oudenaarde, Anzegem, Kortrijk, Vichte. La tuta vilaĝeto estis plena je esperantistoj kiuj kreis gajan kaj bruatan atmosferon.

En preparo estas infankurso, kiun gvidos s-ano Faveere, lernejaestro, prezidanto de la loka sekcio. Verŝajne estos la unua infankurso okazinta en nia lando.

WEVELGEM.

Je fino de la kurso gvidita de s-ano Nico De Graan okazis bela regiona festo, al kiu ĉeestis pli ol 300 personoj. La 3 novaj sekcioj Wervik, Zwevegem, Wevelgem liveris kantistojn, muzikistojn, aktorojn por plenigi ampleksan programon. Oni eĉ povas montri tian feston kiel ekzemplo por la malnovaj grupoj. Estis grandega sukceso.

Angulo de la Sercemuloj

KUDRO-BATALO. — *Rezultato.* — Gajnis la premion : Fino VAN DER MAST kiu sukcesis enmeti en la okulon 60 fadenojn. La dua estis A. DE TROEYER el Arendonck, kun 52 fadenoj. Li ricevos konsolpremion.

Solvo de problemo Nr 24. *Krucvortenigmo:* Hor. L.L.L. — rat — — ligkunveno — kame — iran — ob — kساد — tu — rol — ukr — urb — krestomatio — idealisme — alg — lol.

Vert. — Kork — labori — lim — leda — lgek — sel — alk — iutaĝe — urkol — urn — armilo — avid — aso — ter — utml — natio — nubo.

Solvo de problemo 25 : La birdo flugis : 120 Klm.


Jarbatalo : Fino VAN DER MAST 175 p. Sro K. POLLET 175 p.

Primion gajnis Fino Annie Hellinx kaj Sro De Grootte.

Sro VAN AS 164 p.

PROBLEMO 28 KRUCVORTO (36 p.)

HOR : 1) Fiŝo.



2) Fiŝo (R) — Danger — signalo. (R).

3) Parto de nazo. — Tri sinsekvaj literoj el normala. — Malkonsenti.

4) R. D. — L. B. — dufoje la saman konsonanton. — artikolo.

5) Senti impreson de surprizo. (R). — ne multe.

6) Fari. (R). — metalo. (R). — adverbo.

7) Amfibio. (R). — scii. (R). — senvesta. (R).

8) Supspeco. (R).

VERT. : 1) necivilizita homo. (R).

2) Malfermita tegmenta vendejo. — verde-flava, amara fluaĵo. (R).

3) Objekto. — negacio.

4) Por esperanto. — kie finiĝas iu difinita spaco. (R.).

5) Furaĝa herbo.

6) Vorto per kiu oni distingiĝas ĉiujn objektojn. (R).

7) Iluminilo.

8) Konjunkcio. — prepozicio.


9) Higiena. (R). — interjekcio.

10) Parto de la kapo. (R). — virina vesto. (R).

11) Ofta noktconcerto dum Marto (R.).

Problemo 29 PLEKTLABORO. (4 p.)

A (10), B (2), E (2), L (2), M (2), N (3), O (6), R (1), S (3), T (1).



Formu per la supraj literoj, Horizontale kaj vertikale, substantivojn de la sekvonta difino :

1) Okokula besteto.

2) Peno por venki.

3) Frakto el Ameriko (R).

4) Siropa restaĵo el sukerrafinado.

Por ĉiu problemo ni forlotumos unu premion. 8/10 ajn de la vortoj donas partiprenrajton La solvoj estu ensendataj antaŭ la 5a de Aŭgusto 1937. rekte al sro F. VOLDERS Bredastraat 94 Antwerpen. La difinoj kun (R) estas radikvortoj.

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA (Vlaamsche Esperantisten - Bond)

Voorzitter: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.
Ondervoorzitter: E. Cortvriendt, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
Sekretaris: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.
Penningmeester: Adolf De Keyzer, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
Propaganda: Gerard Lenaers, Willemstraat, 22, Hamme (O. Vl.).
Orgaan: « Flandra Esperantista », maandblad.
Lidmaatschap: 5 fr.; met maandblad: 25 fr.
Postchek: Flandra Ligo Esperantista, Brussel, Nr 2321.50

AFDEELINGEN:

Aalst: « Pioniro ». Sekretariaat: Molenstraat, 30.
Aarschot: « La Progreso ». Sekretariaat: Albertlaan.
Antwerpen: « Flandrema Grupo Esp-ista ». Sekr.: Statiestraat, 156, Berchem.
Arendonk: « La Verda Kampina Stelo ». Sekretariaat: Schotelven, 4.
Blankenberge: « Norda Stelo ». Sekretariaat: Koninginnelaan, 18.
Brugge: « Paco kaj Justeco ». Sekretariaat: Guido Gezellelaan, 15.
Brussel: « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.). Sekr.: P. Van Humbeekstr., 3.
Diksmuide: « Grupo Zamenhof ». Sekretariaat: Maria Doolaegheststraat, 36.
Gent: « Roeland ». Sekretariaat: Rasphuisstraat, 5.
Kortrijk: « Esperantista Grupo ». Sekretariaat: Moeskroenstraat, 11.
Lebbeke: « Vasta Horizonte ». Sekretariaat: Stationstraat, 87.
Leuven: « La Nova Tagiĝo ». Sekretariaat: Broekstraat, 21, Heverlee.
Lichtervelde: « La Tagiĝo ». Sekretariaat: Wetstraat, 44.
Mechelen: « La Estonto ». Sekretariaat: Vekestraat, 25.
Oostende: « Ostenda Grupo Esperantista ». Sekr.: Stw. op Torhout, 219.
Oudenaarde: « Al Paco ». Sekretariaat: Nederstraat, 8.
Roeselare: « Ruselara Esperantista Grupo ». Sekr.: Hoogledesteenweg, 163-165.
Tienen: « Zamenhofs Standardo ». Sekretariaat: Bruulstraat, Kumptich.
Torhout: « La Verda Stelo ». Sekretariaat: Boomgaardstraat, 4.
Vichte: « La Frateco ». Sekretariaat: Harelbekerstraat, 29-a.
Vilvoorde: « La Verda Stelo ». Sekretariaat: Marius Duchéstraat, 45.
Wervik: « Fratiĝo ». Sekretariaat: Brugstraat, 9.
Wevelgem: « Per Esperanto al Mondpaco ». Sekr.: Papenstraat, 54.
Woumen: « Veni, Vidi, Venki » (V.V.V.). Sekretariaat: (Rom. Vandepoele).
Zaventem: « Verda Standardo ». Sekretariaat: Heldenplaats, 115.
Zwevegem: « Paco per Esperanto ». Sekretariaat: Ootegemstraat, 71.

VERTEGENWOORDIGERS:

Assche (Brab.): L. De Rop, Tenberg, 24.
Astene: M. Vanderlinden, Dorp, 54.
Deerlijk: Fr. Benoît, Kapellestraat, 7.
Dendermonde: F. ino Z. Ghysselelinckx, Van Duysestraat, 24.
Hamme (Vl.): G. Lenaers, Willemstraat, 22.
Harelbeke: A. Doornaert, Stasegemstraat, 97.
Mol: L. Claeys, Kapellestraat, 3.
Mortsel: H. Van Durme, Eggestraat, 21.
Ronse: G. De Boes, Wijnstraat, 81.
Sint-Truiden: G. Mathijs, Steenweg op Hasselt, 55.
Tielt: R. Plettinck, Steenweg naar Marialoop.

Flandraj Esperantistoj, via organizo estas:

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA !

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

DRUKKERIJ

★

Aŭtomata Presejo

H. BRAEKEVELT

Statedreef, 177, Roeselare.

Posedas vastan klientaron en la flandraj provincoj.

Presejo konata pro sia belgusta kaj moderna preso.

Liveras al la diversoj esp. grupoj kaj ligoj. Sendevige petu prezoferton kaj modelojn.

Tel.: 1080.



Proksime de la naĝejo (200 m.).

“BREUGHEL”

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacqmainlaan, 37, Brussel

■
Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj.

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)



Café “Nieuwe Carnot”

FRANS NEEFS-D'HELDT

Carnotstraat, 70 — Antwerpen

■
Plej bonaj trinkaĵoj.

Salonoj por societoj — Malvarmaj manĝaĵoj — Bonega servado.

■
Ejo de Flandrema Grupo.

ST MARIABURG

10 KM. DE ANTVERPENO

Grand Hotel de la Chapelle

Iokita en arbarĉirkaŭaĵo ĉia moderna komforto — aŭtomobilejo laŭnteniso — infanludejo — teraso

Restoracio — Familia pensiono

N.B. - Elektita loko por ekskursaj celoj Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

Wwe VAN HAVER-DE BOES

« Presejo Groote Centrale Drukkerijen », Lange Loza nastraat, 181, Antwerpen.